


Robert Louis Stevenson



estis skota verkisto, kies plej famaj verkoj estas pirata romano **Trezorinsuloj** por infanoj kaj horora rakonto **Jekyll kaj Hyde** (legu: ĝekil kaj hajd) por plenkreskuloj. La nomoj Jekyll kaj Hyde estas ofte uzataj pri homoj, kiuj foje kondukas afable, foje bestie.

Robert Louis Stevenson naskiĝis en Edinburgo la 13-an de novembro 1850 kaj de infanaĝo suferis pro malsanoj de pulmoj, eble pro tuberkulozo. Oni dungis por li vartistinon, kiu zorgis pri li kaj rakontis al li fabelojn, kiuj vekis lian fantazion. Liaj patro, avo kaj praavo estis inĝenieroj, kiuj

konstruis lumturojn, por ke ŝipoj ne perdiĝu en nokto aŭ tempesto, kaj la patro esperis, ke ankaŭ Roberto fariĝos inĝeniero. Sed tiu ne havis emon al tiu profesio, li volis fariĝi verkisto. La patro konsideris tiun profesion necerta, tial li devigis la junulon studi juron kaj Roberto fariĝis advokato en sia 25-a jaro. Sed ĉar li havis ĉiam problemojn kun spirado, li multe vojaĝis al sudaj landoj, ekzemple al Parizo, kie li konatiĝis kun usono pentristino Fanny Osborn. Li enamiĝis al ŝi, sed ili devis disiĝi. Ŝi revenis al San Francisco, li al Skotlando. Sed kiam li eksciis, ke ŝi estas malsana, li sekrete forlasis la hejmon kaj forvojaĝis al Usono. Dumvoje li vivtenis sin per artikoloj, tamen al San Francisco li venis malsana, preskaŭ duonmorta. Fanny zorgis pri li kaj kiam li resaniĝis, ili geedziĝis. Poste ili revenis al Eŭropo. Li senĉese serĉis lokojn, kie li povus vivi kun sia malsano, plej multe en Francio kaj Svislando.



Foje lia duonfilo, 13-jara Lloyd Osborn, desegnis fantazian insulon de piratoj. Roberto pruntis de li la desegnaĵon kaj matene alportis unuan ĉapitron de la pirata romano **Trezorinsulo** pri serĉado de trezoro de piratoj kaŝita sur mistera insulo. Ĉefa heroo estas knabo Jim Hawkins (ĝim hokins), kies aĝon ni ne konas. La verkisto ĝin intence ne diras, por ke knaboj inter 12-17 jaroj povu identiĝi kun la heroo kiel pri sia samaĝulo. Li proponis la ĉapitron al loka gazeto kaj tuj leviĝis la eldonkvanto. Stevenson devis por ĉiu numero verki novan ĉapitron. Kiam la romano aperis libroforme, oni devis ĝin plurfoje reeldoni. Tiu romano certigis por la aŭtoro mondan famon kaj estis ankaŭ multfoje filmita.

Stevenson fine de sia vivo forvojaĝis al sudaj maroj, al la insulo Samoa, kiel li konstruigis sian domon kaj verkis pluajn verkojn tre estimata de la indiĝenoj. La 3-an de decembro 1894 dum verkado subite li elsputis sangon, falis en komaton kaj

post kelkaj horoj mortis. Li estis entambigita sur la insulo.

Li fakte verkis nur dum 16 jaroj, tamen li sukcesis postlasi eminentan kaj vastan verkaron. Por knaboj li verkis ankoraŭ romanon **Forkaptita**, pri 17-jara knabo Davido Balfour. Lia onklo ne volas

al li trandoni la hereditan domon, subaĉetas maristojn, ke ili fokaptu la knabon, transportu al Ameriko kaj vendu kiel sklavon. Sed la tempesto pelas la ŝipon al la norda Skotlando, kie ĝi vrakiĝas, Davido saviĝas kaj en tre aventura maniero plena de danĝeroj revenas piede hejmen. Dua parto de la romano nomiĝas **Katriona**. Alia romano por knaboj estas **Nigra sago**, romano el la mezepoko, kiam en Anglio interbatalis du rozoj, du aristokrataj famlioj, York kaj Lancaster, kies simbolo estis blanka kaj ruĝa rozo. Aperas tie ankaŭ fama ĝibulo, 18-jara duko Rikardo, posta reĝo Rikardo la Tria, kiu en la ŝekspira dramo proponas sian reĝlandon kontraŭ ĉevalo. La ĉefa heroo de la romano, 18-jara nobelido Rikardo ne interesiĝas pri politiko, sed travivas multajn aventurojn.

El la verkoj por plenkreskuloj estas la plej konata **Stranga kazo de doktoro Jekyll kaj sinjoro Hyde**. Afabla kaj amata doktoro Jekyll eksperimentas kun medikamentoj, kiuj ŝanĝas lin al demona kaj bestia sinjoro Hyde, kiu faras terurajn krimojn. Aliaj famaj verkoj estas **Klubo de sinmortigantoj**, **Mastro de Ballantrae**, **Trezoro de Fanchard**, **Marbodo de Falesá**, **La insulo de voĉoj**, **Diablero en botelo**, **Mistera barelo**, **Hermistona Vejro** (= jez), **Pavilono sur sablo**, **Markheim**, **Kompanoj**, **Novaj arabiaj noktoj**, **Malfluso** kaj vojaĝpriskriboj **Al la sudaj maroj**.

En Esperanto aperis **La insulo de voĉoj**, dufoje **Diablero en botelo**, **Trezorinsulo**, **Forkaptita** kaj trifoje estis tradukita **Jekyll kaj Hyde**. Trezor-insulo estis plie rerakontita en facila stilo sub titolo **Esperanto sub iom malpli ol 500 vortoj**.

Bildoj el Vikipedio